

Leterkesto-1, kaj pri la kasedo *Persone*

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 novembro 10.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-27/SRI-1988-27-B-6-Claude-Gacond-Leterkesto-1-kaj-pri-la-kasedo-Parsone.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Pluraj geaŭdantoj esprimis la deziron aŭdi de tempo al tempo kanzonojn el la novaj kasedoj aperantaj nun. Jen, hodiaŭ ni aŭdigas al vi erojn el la kasedo 'Persone', kiun pretigis junaj Stockholmanoj : Borje Lund, Per Ola Axelsson, Martin Wiese, Bertilo Wennergren, Thomas Kotzberg, ĉio do registriĝis en Stockholmo. Vi aŭdos erojn el kanto, kies parolojn ni donos al vi unue, almenaŭ la komencon, montrante al vi ke tiu teksto de Bertilo ne estas tre matura lingve.

« La unuan fojon ke mi vidis vin,
estis vi plej ĉarma eta junfraŭlin'
Mi vin tuj ekamis spite al ke vi rifuzis min,
nun post kelkaj jaroj jam delegas vi
en okuloj viaj estas simpati'
estas mi amiko via,
sed mi volas ion pli »

Jen vi aŭdas tiun ĉefe bruon kasedon, kiun multe ŝatas la gejunuloj nuntempe.:

(muziko)

Cl.- Kaj nun ni salutas kelkajn geaŭdantojn kaj respondas al leteroj.

A.- Ni salutas Lennart ABERG en Gotenburgo, Svedio.

Gerardo AGUILA CARRETERO en Guadalajara, Meksikio, lernas esperanton kaj tion skribis en la germana.

ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ, LITOVA FILIO sendis al ni plaĉan infanlibron, kies titolo estas 'Koko kantisto kokerikisto'. Ni esperas, ke tiu bele ilustrita kaj lingve agrabla unua eldonaĵo anoncas aliajn.

Cl.- Günther BECKER en Blieskastel, Germanio okcidenta, honora prezidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo, dissendis la ĉi-sekvan resumon pri la dudek-jara aktiveco de la eldonejo Artur E. Iltis, kies vigliganto estas fakte [Reinhard HAUPENTHAL](#). Ni citas lin: "En printempo ĉi-jara la eldonejo Artur E. Iltis povis retrorigardi al 20-jara historio. Fondita en 1968, ĝi lanĉis kiel unuan eldonaĵon la satiran libreton de Kanguruo, Kiel (mal)venkigi Esperanton? kiu tuj garantiis al ĝi la atenton de la publiko. La ĉefa celo tiama, tamen, estis rehavigi elĉerpitajn lingvistikajn kaj literaturajn verketojn, kiel atestas la titoloj de la unuaj jaroj: Unua Libro de Zamenhof kaj ties Granda Vortaro Deutsch-Esperanto, Verhaltniswörter de Wüster kaj du vort-faraj studoj de De Saussure. En 1970 sekvis Mondo kaj Koro de Kalocsay, en 1973 faksimilo de la fama Zamenhofa Letero al Emile Javal. Post plur-jara paŭzo Iltis reprenis sian agadon en 1977 en la kadro de Sarlanda Esperanto-Ligo. De tiam

vastiĝis la programo, kiu nun ampleksas (inter 1983-1987 kiel jubilea eldon-serio), kvin libro-seriojn: originala beletro, tradukita beletro, esperantologio, interlingvistiko kaj scienco. Jen kelkaj aŭtoroj kies verkoj aperis sub la ŝildo de Iltis: Adamson, Albault, Auld, Becker, Bein, Bernard, Boulton, Conterno, Cseh, Diego, Drezen, Grabowski, Hauptenthal, de Hoog, Kalocsay, Lippmann, Manders, Minor, Neergaard, Newell, Piĉ, Plehn, Ragnarsson, Ribillard, De Saussure, Szilágyi, Schenkel, Schmidt, Schwartz, Stuttard, Urbanova, Varankin, Vatré, Wingen kaj Zamenhof. Al la kontribuoj por la Jubilea Jaro apartenis inter alie la represo de la monumenta romano [*Kiel akvo de l' rivero, de Schwartz*](#), la germana versio de Lingvistikaj aspektoj (Wells/Becker), kaj la lanĉo de plia Piĉ-romano, *Klaĉejo*. Ĉi-lasta aŭtoro, nun diskutata ĉe ĉiuj anguloj de Esperantujo, lanĉiĝis ĉe Iltis. Al la iniciatoj de la Iltisa Skolo apartenas ankaŭ la Literatura Manifesto 87, kies tekston pluraj Esperanto-gazetoj rifuzas publikigi. Espereble la frukto-dona agado de Iltis kaj ties kontribuo al la Esperanta kulturo daŭros ankaŭ en la estonteco", konkludas Günther BECKER, kaj ni nur povas apogi lian esperon. Ni menci, ke ni havis la okazon plurfoje atentigi niajn geaŭdantojn pri la valoro de la verkoj de Karolo PIĈ kaj pri la menciita manifesto. Ni tutcerte havos la okazon remalfermi diskutojn pri la menciitaj verkoj kaj pri tiuj, kiuj certe aperos.

A.- Ni salutas Eric BENECH en Istres, Francio kaj Fredo BOHRINGER en Wannweil, Germanio okcidenta. Jana BRUDER en Köln, Germanio okcidenta skribis: "Kun granda ĝojo mi aŭdadas viajn elsendojn. Mi estas esperanta komencanto kaj ekde 2 monatoj aŭdanto de Svisa Radio Internacia. "

Cl.- Kaj nun vi reaŭdu el la kasedo ‚Persone‘:

(muziko)

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Salutas vin Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis reaŭdo!